# ★ La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio*
*Fondita en Julio 1920.*

**Redakcio-Administracio :**
Box 731F, **Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).**
**Abono** (por 12 numeroj):
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.
Redaktisto: Reginald Banham.
Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.
Unu numero: 4 pencoj. **Anoncoj**: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

**N-ro 121 (Tenth Year) Melburno** (Melbourne), **Australio.** 10 Julio 1930.

## TEN YEARS OLD!
### Birth-month of "La Suda Kruco."

It is with pride that we are able to announce with this number that "La Suda Kruco" has reached its tenth birthday, having been founded in July, 1920.

The way along which it has passed and is passing bears many thorns, and its rock-strewn declivities call for care in passing them, but it is not, we are glad to say, a path unrelieved by here and there an umbraged glade in whose coolness fresh courage has been taken to face again the dust and heat of further travel.

In other words, while the task of editing "La Suda Kruco" has, from the beginning, been accompanied by a seldom-ceasing anxiety as to the permanent establishment of the paper, its several editors have never been without the cheering assurances given from time to time of the faithful support of not a few imbued with zeal for the "Suda's" welfare.

We enter upon the next decade in the spirit of sober optimism. The recent appeal was answered by guarantees to the sum of ten pounds. This, with an awakened interest on the part of the clubs in furthering, with steady determination, the fortunes of the paper should relieve the Redakcio of any immediate financial difficulty. A matter yet to be satisfactory arranged is the organising of healthy selling "agencies" for S.K. in the club rooms of every city. Could not the paper be prominently displayed at every meeting and its claims on the support of members urged? Yes, much remains to be done before the goal—the guaranteed existence of "La Suda Kruco"—is reached.

While undulations of encouragement have reached us from clubs or individuals in W.A., N.S.W., Tas., and N.Z., from Queensland and S.A. we hear little or nothing. We would that these states join their strength to that of the rest in a concerted effort to end the uncertainty that must characterise the life of the S.K. **until such time as the organised Esperantists of Australia shall guarantee it financially as their official organ.**

True it is that we are passing through a period of industrial depression that is being felt keenly in some homes, but when we look on the densely packed tiers at the many theatres, or watch the surging throngs storm the various sport stadiums, we feel it within reason to ask, is it not possible for the Australasian Esperantist to deny himself for the sake of the "Suda"—to the extent of a penny a week?

Those that provide the life-blood of our national organ, and guide its destinies, are conscious of high honor, in that they are sharers of the same mighty impulse that moved La Majstro. They are sustained by a unshakable faith in Esperanto, that is is winning its way surely throughout the world, and is destined sooner or later to occupy in the affairs of men the importance of electricity and the railroad.

May all of us, on this anniversary, dedicate ourselves afresh to the noble task our loved leader himself so gloriously entered upon but in sorrow left unfinished.

Ne tre facila estos nia vojo kaj ne malmulte ankaŭ ni suferos; sed batalante, kun plej granda ĝojo senhalte ni laboros kaj esperos.

## FONETIKA LITERADO.

Ni ricevis de s-ro George Higgie, Rothesay, Scotland, gazetojn presitajn interalie en Esperanto kaj en Pitmana fonetika literado.

## A STEP FORWARD.

All those who wish success to La Suda Kruco in its battle for a place in the journalistic sun that sheds its rays on life in the Esperanto world, will be pleased to learn of the reason behind the appearance of extra New Zealand news matter this month.

The N.Z.E.A., for a certain small but assured subsidy, has agreed to adopt the S.K. as its official bulletin, sent free of cost to all N.Z.E.A. members three times a year. The gazette will thus find its way into the hands of over 200 Dominion Esperantists who hitherto have not been registered as regular subscribers.

This decision is significant, for it represents a step forward on the difficult road that, we trust, will eventually bring us to the satisfactory position of having solved, once for all, that dreary problem—the founding of a truly **official** organ.

We earnestly ask all those N.Z. "samcelanoj" who are reading this their first "Suda" to enrol themselves forthwith as full subscribers to our little paper, and so support what we sincerely believe to be a vital necessity for the conservation and spread of Esperanto throughout Australasia.

—La Redakcio.

---

## KRONIKO.

AUCKLAND, New Zealand.—The annual meeting of the Auckland Esperanto Society took place on 7th May in the New Church Hall. Mr. J. Russell, D.B.E.A., one of the earliest New Zealand Esperantists, presided over a good attendance. The following officers were elected for the new year:—President, Mr. J. Russell, Vice-pres., Mr. E. Clarke; Treasurer, Mrs. E. Watkin; Organiser, Mr. G. Wheeler; Committee, Rev. F. Woolloxall, B.A., Messrs M. Marinovich, and G. Day; Secretary, Mr. J. Lauder (Purewa Camp, St. Helier's Bay Rd.).

The Society will meet each Monday at 7.30 p.m. in the New Church Hall, Newton Road, the Church authorities generously permitting the free use of two rooms in the hall. For this practical exhibition of true brotherhood the authorities are to be heartily commended.

The president of the N.Z.E.A., Mr. C. Adcock, of Drury, visited the Society in May and demonstrated the celebrated "Ĉe" method of teaching. A teacher by profession, Mr. Adcock is admirably capable in this special field.

CHRISTCHURCH, N.Z. — Esperanto continues to enjoy a prominent position in the "Cathedral City" of New Zealand, as the following indicates:—

**Esperanto Society.**—Owing to the formation of the Esperanto Class under the auspices of the Workers' Educational Association, made possible by the bequest (£500) of the late Mrs. Ensom, the Society members have suspended their own meetings and now meet weekly at the W.E.A. class in order to help it forward. This class has an average attendance of about a dozen, although twice that number are on the roll. At each meeting the Linguophone textbooks are used and, with a view of obtaining correct pronunciation, Prof. J. Findlay's discs are played, members usually singing the words of the song "Samideana Trinkkanto." There are good prospects of another class being formed at the local Y.M.C.A.

**Radio.**—Mr. N. M. Bell, M.A. continues to deliver his six-weekly broadcast on Esperanto from station 3YA, these proving to be valuable propaganda. The last talk took place on June 16, at 7.30 p.m.—during a very popular session of the station's programme.

**"Star" Column.**—Arrangements have been made for the appearance in "The Star" of a monthly Esperanto column. Two full columns (May and June) have been published.

**"Star" Circle.**—Over 30 children are receiving tuition and are progressing well in this study class arranged by "The Star." Mr. A. More ably fills the position of tutor.

**Propaganda.** — The W.E.A. class secretary (Mr. E. Kalin, 107 Antigua St.) has circularised all school-teachers and churches in the Christchurch district, and also the Chamber of Commerce.

HAMILTON, N.Z.—On the 19th May, Mr. C. Adcock visited this town and lectured on Esperanto to the Rotary Club, comprising about 40 members, who received him most enthusiastically. In view of the keen interest displayed in the subject, the Club granted the speaker an extension of 15 minutes—an infrequent occurrence—and after the lecture Esperanto textbooks and literature were distributed to all specially interested. Mr. Adcock also addressed the local Esperanto Club, which, as a result, has renewed activities after a brief halt, and will now meet monthly. A translation course has been inaugurated.

MASTERTON, N.Z.—The roll of the Esperanto Group of Masterton now contains 17 members. Under the guidance of Mr. A. Dewar the class has

made splendid progress, as is reflected in the volume of correspondence undertaken by the students, who now possess correspondents in Germany, Persia, Italy, Jugoslavia, Czechoslovakia, Spain, Sweden and Russia. Can any other N.Z. club better this list? Our active secretary (Mrs. L. Payne, 8 Bruce St.) continues to "spread the light" of Esperanto by means of regular and striking paragraphs in the local newspaper, this being in no small way responsible for our prosperous state.

WELLINGTON, N.Z.—The Wellington Esperanto Club, which meets every Tuesday evening in the Y.M.C.A., is the most virile of the Dominion Esperanto clubs, due chiefly to its harmonious and energetic executive. The present club was founded nearly three years ago, and, after the usual vicissitudes of young clubs, has settled down to serious propaganda and study.

Meetings open at 8 p.m. by the secretary reading, in Esperanto (the official language of the club), the minutes of the previous meeting. A translation is made in English. Members then go to their classes.

The teachers are Mr. E. Jack (President), Miss Coralie Smythson (Vice-president), Mr. L. Dust, D.B.E.A. and Del. of U.E.A., and Mr. B. Potts, F.B.E.A. (Secretary—34 Argentine-av., Miramar). Each teacher uses a separate blackboard and tuition proceeds until 9 p.m. One teacher takes the beginners to the seventh lesson in the lesson book; another takes from lesson eight to fifteen, and so on. Students advance from class to class, this providing an incentive to progress.

The second half of the evening is devoted to an all-Esperanto programme organised by the secretary, in which addresses are given in Esperanto by fluent speakers. The students are encouraged to give readings, and short comedies written by either the vice-president or the secretary are regularly presented, the roles including as far as possible the younger students who are sufficiently advanced.

The evenings are interesting, and visitors are invariably impressed with the attractive procedure and with the Esp-o fare provided. Reports, prepared by the secretary, appear regularly in the local newspapers and thus good publicity work is being done.

SIDNEJO, N.S.K.—S-ro G. Chapple de Sydney jam vojaĝas per vaporŝipo Moreton Bay al Anglujo kaj Eŭropo.

Lastnumere ni sciigis, ke oni diskutis eventualan okazigon de Esp. kongreso en Sidnejo proksiman paskon, 1931. Oni celas samtempigi ĝin kun la oficiala malfermo de la giganta havena ponto, ĉar tiam multe da vizitantoj troviĝos en Sidnejo, tial bonokaze estos por ni reklami Esp-on.

Sed jam sciate estas, ke oni ne lokmetos la finlastan vinkton antaŭ jarfino 1931, eĉ pli estonte. La jara aferkunveno de SES (la 19an de junio) do decidis prokrasti la aferon, atendante fikson de difinita dato por la malferma soleno.

Samkunvene la plimulto el la jamaj oficistoj re-elektiĝis jene: Prez.-s-ro E. Pryke, D.B.E.A.; Vicprez-oj, fino G. J. Orr, D.B.E.A.; prof. Randal Woodhouse, s-ro Feconya; sekretario, s-ro L. Pfahl; kasisto, s-ro H. Davies; helpsek., f-ino Fleming; bibliotekisto, f-ino F. Smith; kont-ekzamenisto, f-ino Harrison.

PERTH, W.A.—En junio s-roj Pyke kaj Hussey trapasis tra Perth, vojaĝante Oxfordon, por ĉeesti la mondkongreson Esp-an. Pro tio, ke nia societo tro malfrue sciiĝis pri ilia alveno, ĝi malfeliĉe ne povis havigi al si plezuron, renkonti tiujn bonekonatajn E-istojn. Tamen, ni volas al ili tre ŝatatan vojaĝon kaj sendanĝeran revenon.

Dimanĉvesperon (15an) s-ano estimata s-ro Alex Saar, vicprez. de nia societo, faris informoriĉan paroladon el 6WF pri "Esperanto, kio ĝi estas." Li parolis dudek minutojn al vasta aŭskultantaro. Espereble, ke oni daŭrigos ĉi tiajn radi-elsendojn dum la vintro.

MELBOURNE, Viktorio: Invitite de la Melburna E. Klubo, la Esp-istaro kunveniĝis la 28an de majo, por diri bonvoyaĝon al s-roj J. Pyke kaj G. Hussey, kiuj ekiris unu semajnon poste, por ĉeesti la E. Kongreson en Oxford. Ĉeestantoj ĝuis programon de kantoj, konkursoj, ŝaradoj ktp.

Ĉe la Societejo s-ro Skurrie interesotene paroladis pri E. kantoj. Lia manuskripto enhavis multe da tre belaj kantoj, el kiuj kelkajn li mem tradukis, kaj la vortoj kaj muziko formas libron havindan kaj utilan.

La unua' dancfesto en la jaro okazis la duan de junio, kaj dank'al bona vetero, gaja muziko kaj festa humoro kontentige sukcesis. La komitatanoj faris belajn rozojn el papero, kaj tiu, kiu tenis la bonŝancan floron gajnis premion.

S-ro Hudson daŭrigis la rakonton pri sia hinduja vojaĝo. Li atingis Darjeeling, kiu estas sur kape neĝkovritaj montoj. Veturante ĉirkaŭaĵe, li vidis grandan soldatejon, kien, pro la saniga aero, la soldatoj iras, por resaniĝi.

Budda templo estas vidinda konstruaĵo en la najbareco. Elefantoj, tigroj, pumoj kaj brunaj ursoj vagas en la regiono. Post reveno al Calcutta, kie li restis kvin tagojn, li surŝipiĝis kaj veturis 90 mejlojn laŭlonge de rivero Hugli, kiu estas larĝe unu mejlon je sia enmariĝo. Post tri tagoj la ŝipo atingis Rangoon, la ĉefurbo de Burmo. Li rimarkis tie kelkajn kuriozaĵojn, ekzemple: la radoj de la ŝarĝveturiloj estas naŭ futojn altaj, kaj homoj, anstataŭ ĉevaloj, tiras veturilojn. En Rangoon sidas tre bela parko kaj lago Viktoria. Ĉi tiu urbo estas rimarkinda pro sia grandnombro da pagodoj kaj temploj, preskaŭ ĉiuj konstruitaj el tektona ligno. Li veturis vagonare ĝis Mandalay, kie sin trovas fortikaĵoj, palacoj ktp. En la tre ebena kamparo oni ĉie vidas la rizkulturon.

## AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Kun vera danko ni kvitancas jene abonojn ktp. de fideluloj. F-ino L. Saw abono k donaco, julio, '31; diversaj vendoj 7/10; C. O'Dwyer, 4/6, dec., '30; C. Clarke, 4/6, majo, '31; H. Leighton, 4/6, junio, '30; s-ino Wilson, 5/-, junio, '31; f-ino L. Irwin, 4/6, junio, '31; J. McDonald, 4/6, majo, '31; F. McLeod, 4/6, aprilo, '31; M. Cecich, 4/6, aprilo, '31; E. Hubner, 4/6, aprilo, '31; f-ino M. Cullington, 10/-, aŭg., '31; L. Hiob, 5/-, majo, '31; J. Mader, 5/-, aŭg., '31; Brisbane E. Club, 5/6 anonco, majo, '31; J. McGuigan, 5/-, majo, '31; W. King donaco k abono, 10/-; N.Z.E.A., subvencio, £3/7/6; J. Galloway, 9/-, marto, '31; P. Dean, junio, '32; D. Guilbert, 4/6, junio, '31; E. Chung Gong, 4/6, julio, '31; f-ino A. Ryan, 4/6, junio, '31.

### S-ro P. Dean Eŭropon !

El vaporŝipo Orvieto venas adiaŭsaluto de N.Z-a samcelano P. Dean, kiu bondeziras per ĝi la aŭstralazian E-istaron. Li revenas sian hejmlandon Jugoslavio. Fidela Zamenhofano, arde li disportas la sanktan flamon.

## TO THOSE OVERDUE.

We would draw the attention of all lapsed or overdue subscribers to the urgent need, at least from our point of view, of fulfilling their obligation to a gazette which, at no small cost of time and money, is regularly sent to them. We trust that the considerable number to whom reminders were recently forwarded will see that their contribution to the common task reaches us without undue delay.

## KURSO PER TRADUKADO.

**(kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A.; sekretariino, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melb., E.10.).**

### TRADUKO 8.

### LA CIGANA VIVMANIERO.

**(daŭrigata)**

Iu montro al ilia Hinduja deveno troviĝas en la fakto, ke ili nomas ĉiun transmaran landon Hindi Tem, kaj "Hindi" en la Hindustana lingvo signifas "Hindo".

La Cigana lingvo, kiun ili ĵaluze konservas, estas malmultvorta, treege antikva, kaj enhavas ne multe pli ol dek kvarmil (1) vortojn (8), el kiuj la plimulto ŝajnas esti el Hinda deveno, kaj la cetero estas stranga miksaĵo deveninta (4) de diversaj orientaj kaj okcidentaj idiomoj. Kelkaj vortoj estas Arabaj kaj multaj estas Persaj.

Rilate al siaj karakteriza feliĉeco kaj amo al la naturo kaj dolĉaj sonoj la Ciganoj estas enviindaj. Vivante kiel kuniklo pelata (4) de unu komuna tero al alia, ili tenas sian facilkorecon sub ĉiaj kondiĉoj.

## FORMORTANTA RASO LA AŬSTRALIA INDIĜENO.

**(el "The Argus" de Melbourne.)**

Verŝajne estas, ke neniu donis pli multan tempon nek pli simpatie interesis sin pri la Aŭstraliaj indiĝenoj ol profesoro Sir Baldwin Spencer. En la tempospaco inter la jaroj mil-okcent-naŭdek-kvara kaj mil-naŭcent-dudek-sesa (1) li vizitis la pli sovaĝajn regionojn de Aŭstralio, celante aldoni al la komuna scio pri la indiĝenoj. Li gajnis la fidon de la nigruloj, kaj pro tio ili permesis lin (2), vidi kaj eĉ fotografi iliajn plej sekretajn ceremoniojn. Ŝajne nenio restis kaŝita antaŭ (3) li. La rezultojn de sia penplena esplorado li donis (2) al la publiko en kelkaj libroj, plejparte verkitaj kunlabore kun la estinta sinjoro F. Gillen.

Sir Baldwin Spencer ĵus publikigis pluan verkon, nomitan "Wanderings in Wild Australia" (Vagadoj en sovaĝaj regionoj de Aŭstralio), entenantan, (4) ĝeneralan priskribon pri la pli sovaĝaj partoj de la kontinento, ĝia vegetaĵaro, bestaro kaj geologia historio.

En la interno de Aŭstralio ankoraŭ sin trovas indiĝenoj vivantaj (4) en tiel sama (5) primitiva maniero, kiel vivis la homoj en la ŝtonepoko. Ĉie, kie la trakontinentaj vojaĝlinioj kuntuŝiĝas

kun triba teritorio, kaj ĉie, kie kontaktiĝas blankuloj kaj la tieaj indiĝenoj, ĉi ties (10) ĉarmo multe malpliiĝas. En la granda terspaco inter la montoĉenoj McDonnell (makdonel) kaj la plej orientaj kolonietoj de Okcidenta Aŭstralio, kaj en iuj (9) nealireblaj partoj de la duoninsulo Cape York (kep jork) ankoraŭ sin trovas triboj, ne ricevintaj (4) la dubprofitojn de la civilizacio. Sir Baldwin Spencer en la daŭro de kelke da monatoj vivis en ĉiutaga kontakto kun certaj (9) triboj en tiuj partoj, kaj oni devas respekti liajn opiniojn, ne nur pro lia sciencista merito sed ankaŭ pro tio, ke li neniel celis profiton por si.

Li ne konsentas kun la ĝenerala kredo, ke la indiĝena viro traktas la edzinon aŭ edzinojn kiel ŝarĝbruton (6), nek ke li tenas por si la plej bonan manĝaĵon kaj ĵetas la intestojn al la edzino. Li skribas:—Mi kiel eble plej atente observis la indiĝenojn, sed ŝajne ĉe la manĝoj oni donis (2) porciojn al ĉiuj viro, virino kaj infano sen ia favoro al kiu ajn krom tio, komprenebIe, ke oni unuavice donis (2) al la viroj. Ofte en diversaj lokoj en Meza Aŭstralio kaj en la plej nordaj regionoj mi observis indiĝenojn, vivantajn (4) sub ordinaraj kondiĉoj en siaj kamploĝejoj, sed neniam mi vidis virinojn humile sidantaj (7) malantaŭ la viroj kaj ricevantaj (7) kiel sian porcion nur pecetojn aŭ restaĵojn, kiujn ĵetis al ili la edzoj kaj mastroj.—(daŭrigota).

## NOTARO 8.

1. En ĉi tiu kurso oni skribu numeralojn per vortoj pro sinekzerco je ĝusta legado.—2. Rimarku la frazkonstruon kun aktiva anstataŭ pasiva verbo por eviti kunmetitan verbtempon.—3. "kaŝita antaŭ" (aŭ "al" aŭ "for de"). Ne skribu "kaŝita de", ĉar "de" post pasiva participo ĉiam signifas "by". Ekz. 25/24.—4. Adjektiva participo. Notaro 1/6.—5. "tiel sama", similar. (Ekz. 28/3)—6. Akuzativo, ĉar oni subkomprenas "oni traktas"—7. Nominativo, ĉar la participo ĉi tie estas predikata. Cox 107b. Notaro 7/9.—8. Akuzativo, ĉar "ol" ne estas prepozicio. La vortoj "ne multe pli ol 14,000" estas kvazaŭ unu nepreciza numeralo.—9. "iuj" aŭ "certaj".—10. "ĉi ties", the latter's.

## TAKTO.

Usono senatano sidis apud franca diplomato ĉe festeno. —Vuli vu, e-e-e-sivu plej, e-e-e....li balbutis, provante paroli france.

—Sinjoro, diris la diplomato afable, —mi petas, ke vi ne ĝenu vin paroli france. Via akcento estas tiel pariza, ke ĝi preskaŭ min nostalgias.

## NEW ZEALAND SECTION.
## (N.Z.E.A.)
### 3rd Official Bulletin.

In accordance with a decision of the N.Z.E.A. its official bulletin will henceforth be published thrice annually as part of "La Suda Kruco." This step should ensure closer co-operation between N.Zld. and Australia. The journal will be mailed monthly to members paying the full subscription (5/- yearly, to "La Suda Kruco," Box 731 F, P.O., Elizabeth-st., Melb.).

### Last Year's Work.

Reviewing the results of the first year's operations of the N.Z.E.A. one finds the Association strongly established and well organised; the membership at the close of the year numbered 210, located in 76 localities; a deputation from the Association presented a petition on behalf of Esperanto to the Minister of Education, and the Director of Education, in reply, notified that teachers might form Esperanto classes in New Zealand schools after school hours; the First N.Z. Congress was successfully organised and held; two numbers of the "Official Bulletin" were issued, and 3,000 copies of a specially compiled propaganda leaflet published; several lectures were given in Rotary Clubs and from the Y.A. stations, and many feet of propaganda and other matter placed in the colums of the Press. At the end of the financial year the receipts of the Association exceeded expenditure by about £10. A very busy year.

### The New Year.

The N.Z.E.A. is now traversing its second year, commenced in a manner that betokens an increase in the usefulness and activity of the Association during 1930-31. Already over 70 renewed subscriptions and 15 from new members have been received. Included among the former is the subscription of Mr. R. Wright, M.P., and ex-Minister of Education, and among the latter is that of Mr. F. Combs, M.A., a Wellington primary school headmaster and recognised education authority. As during the past year, good support is given this year to the Association by members of the teaching profession.

### Important Undertakings.

After completing a volume of work resultant from the first Congress, the N.Z.E.A. has steadily pushed forward its policy of gaining, on the one hand, recognition for the language in educational circles and in public opinion, and, on the other, of affording assistance to the movement and to Association mem-

bers. Towards the end of January last, the N.Z.E.A. conveyed to the Minister of Education (Mr. Atmore) a resolution passed by the Auckland Esperanto Club asking that primary-school teachers be given the option of teaching Esperanto in preference to a foreign language. The Minister said that as Esperanto is not recognised as a subject for the University Entrance and the Professional Examinations he was not able to see his way to include the teaching of Esperanto in the public school syllabuses. This intimation was submitted, together with a copy of the petition previously presented to Mr. Atmore, to the Registrar of the University of New Zealand, who was requested to place the matter before Senate. The Executive Committee (University) considered the question and referred it to the meeting of the Academic Board in November next. So far so good!

With a view to obtaining a definite authority to which to refer occasional critics and opponents of Esperanto (one or two still exist!), the Secretary of the Department of Scientific and Industrial Research (Dr. Marsden), at Wellington, was then communicated with and requested to investigate the claims of Esperanto through a competent body such as the British Association for the Advancement of Science. The Department has taken the necessary action, and its pronouncement is awaited with interest.

The N.Z.E.A. accepted the opportunity afforded by the departure during April of the three New Zealand delegates to the Geneva Labor Conference arranged by the International Labor Office, to present an Esperanto textbook and literature to each of those gentlemen, in this manner bringing the claims of Esperanto before them in a practical way.

### For the Movement.

An appeal for the Vienna Deficit Fund, made in the last issue of the "Official Bulletin" and to club secretaries, brought a generous response from members. The fund already benefits to the extent of £3/10s., and other sums have been promised; and at the time of writing two clubs have yet to forward their collections.

In an effort to increase the number of U.E.A. delegates and members in New Zealand, the N.Z.E.A. has been collaborating with the energetic U.E.A. delegate at Wellington (Mr. L. Dust, 20 Chelsea-st., Miramar), whose services during the past two or three years in the interests of the U.E.A. are outstanding. It is pleasing to note that Dargaville—in the past an Esperanto stronghold—will shortly have its delegate in the person of Mr. A. Gregory, one of the earliest Esperanto pioneers in the Dominion.

Congress-members will recall that during the First Congress the question of establishing a New Zealand Esperanto Examination Committee was raised and discussed, it being then decided that the N.Z.E.A. Executive combine with the Board of Examiners which has been operating, for the purpose of exploring the matter. The question has proved a difficult one, and investigation is still proceeding. The present examination procedure—obtaining examination papers from London, returning the answers for marking, then finally receiving a result notification by post—necessitates a lengthy time of waiting, which should be, if possible, much shortened. It is hoped an improvement will be effected.

### A Special Request.

Members not yet having renewed their subscriptions for the current year (2/6) to the N.Z.E.A. are enjoined to give the matter their early attention. The amount may be forwarded either direct to the secretary (7 Brook-st., Wellington), or paid to club secretaries at the different centres.

### An Energetic Club Secretary.

One of the most energetic Esperanto secretaries that one can find anywhere in the Esperanto world is probably the secretary of the Wellington Esperanto Club—Mr. Bertram Potts, whose activities in great measure are responsible

**HAROLD PUDNEY** **Specialisto pri Fontanplumoj**

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcianta fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis renoveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

**7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.**

for the continued development of the club.

Always to be relied on to undertake work for Esperanto, Mr. Potts is a tower of strength to his club. One of the features of the Club's evening programmes has always been his weekly address, delivered in fluent Esperanto, covering such diverse and educative subjects as: "Volapuk kaj Ĝia Interesa Historio," "Mark Twain-Lia Vivo kaj Humoreco," "La Ĉina Sistemo de Ideografa Skribado," "Beethoven-Tragedia Vivhistorio," "La Teorio de Wegener pri la Migrado de Kontinentoj," "William Harvey kaj la Eltrovo de la Cirkulado de la Sango," "Socrates kaj Plato-Ilia Influo al Greka Filozofio," "Je la Rando de la Biologio," "La Progreso de Psikologia Scienco," "La Astronomiaj Eltrovoj de Copernicus, Tycho Brahe, kaj Galileo," "Kapitano Scott kaj Lia Antarktika Esplorado," "La Triumfo de Malnova Egipta Arkitekturo," "La Horologio-la Scienco de Tempmezurado," kaj "Kiamaniere la Parolfilmoj Parolas." These are only a representative selection of Mr. Potts' addresses which have been appreciated by both students and experienced Esperantists attending the club.

## THE LANGUAGE OF PAN-EUROPE.

I would have hesitated to publish those thoughts which for a long time have been mine, had it not been for the fact that at Oxford, before the University Union, a body devoted to the study of problems affecting the League of Nations, it was again recognised that the chief obstacle to the pacification of Europe is the multiplicity of European idioms.

Sir Clive Morrison Bell, M.P., expressed himself as follows: "Imagine the astonishment that would be felt in Great Britain were we to hear that, in the interests of international unity, we must renounce our splendid language and adopt say French or Russian. If, on the other hand, the United States of Europe should be constituted without our participation (and this seems to me very probable, for if Great Britain moved towards federation it would be a federation of those nations that compose the Empire), then imagine the feelings of the French people, were it one day decided that German henceforth should be Europe's international tongue."

Mr. A. Meillet, professor of the College de France, has estimated that there are in Euro - 66 distinct languages, of which 12 alone are spoken by more than ten million people. How exasperating it is on arriving, for example, at Budapest, to realise that your brain racking study of French English, German, Russian, yes, and even Japanese, has gone for nothing, because in the Hungarian capital you find that it still pleases its citizens to speak Magyar! Furthermore, let us note that it is the small nations that are the most fanatically attached to their idioms. They try to make up for their feebleness by shouting at the univ rse in sounds that no-one but themselves can understand! Is it not high time to put an end to this imbroglio?

Let us suppose that beginning with the year 1932 every schoolchild in Europe shall stuly as a compulsory subject, besides their national tongue and for the same length of time each week, the European language, and that certain manuals, printed in that tongue, shall spread everywhere the same principles, based on justice, white-race solidarity and pacificism. Only then will it be possible to say with truth that the foundations of a unified Europe are being well and truly laid.

(From the French of Ludovic Naudeau, in l' Est Republicain.)

## ESPERANTO AND EDUCATION.

The secretary of the Royal Society of Arts, the largest examining corporation, announces that from April, 1931, the R.S.A. will hold examinations in Esperanto.

The recent brochure "Esperanto in the School" contains a press error. The, number of Esperanto teachers is 4478, not 447. The number now reached, however, is almost 5500.


## *SUBTENU LA SAMIDEANAJN METIISTOJN!*

**PERCY HOLMES**
**Elektristo Kaj Radiisto.**

Lumiloj, gladiloj, purigiloj, motoroj, ventumiloj sperte instalitaj kaj riparitaj. Se via radia aparato ne bone funkcias, tuj sciigu al P. Holmes, 212 Noone str., Clifton Hill.

Memoru—Por ĉio elektra.

**Telefonu: JW 4017.**

**Lingvaj respondoj.**

(1) Kion signifas "lui"?

"Originala Verkaro" 248: "Lui" signifas nur "preni lue"; "doni lue" estas "luigi" (Zamenhof). Ĝenerale oni trovas, pro pli facila komprenebleco, "lupreni," "ludoni."—Simile: "prunte doni, prunte preni."

(2) La servisto hejtas la fornon, kaj la forno hejtas la ĉambron.—Ĉu en ambaŭ frazoj la verbo "hejti" estas uzebla?

Ne; la forno ne hejtas la ĉambron· sed varmigas ĝin.

(3) Oni diras "la ekstera flanko"; ĉu oni rajtas paroli pri "la ena flanko"?

Se la esprimo plaĉas al vi, uzu ĝin; sed—ĉu oni komprenos vin samfacile kiel oni komprenos, se vi diras "la interna flanko"? Cetere, ni adjektivigas multajn prepoziciojn: anstataŭa, antaŭa, apuda, ĉirkaŭa, duma, ekstera, kontraŭa, kroma, kuna, pera, posta, suba. supera, sura· transa.

(4) Kia diferenco ekzistas inter "trouzi" kaj "misuzi"?

La prefikso "mis-" havas la sencon de malĝuste, malbone. Mi misuzas apogseĝon, se mi uzas ĝin kiel glitveturilon (tion mi faris kiel infano!); mi trouzas la pardonemon de mia patro, se mi konscie agas kontraŭ lia volo ĉiutage, pensante: li ja pardonos! "Trouzi" estas uzi super la kutima, ordinara mezuro, "misuzi" estas uzi en maniero, kiu . e estas ĝusta.

## CONGRESS ON SEXUAL REFORM.

### Wien, Sept., 1930.

We have received from the committee for the above a programme in German, French, English and Esperanto. It contains the order of lectures, advice to those attending the congress, and a statement of the aims for which the World League for Sexual Reform stands. Havelock Ellis is one of the presidents. Postfach 63, Wien 1/15.

"La Internacia Medicina Revuo" (No. 3, 1930) contains a long and interesting speech by Dr. J. Leunbach at the congress of this league in London, 1929. Every Esperantist doctor of medicine should subscribe to this excellent review. Address: D-ro Kempeneers, 20 rue aux Laines, Bruxelles (Belgujo).

---

Cinikulo estas homo, kiu konas la prezon de ĉio kaj la valoron de nenio. Kaj sentimentalulo estas homo, kiu vidas absurdan valoron en ĉio kaj ne konas la foirprezon de iu unuopa aĵo. (Oskar Wilde).

---

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd. Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str:, proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President. Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.

**Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Box 731F. P.O. Melb., by the Triumph Press, Surrey Hills, Vic. Registered at G.P.O. Melbourne, for transmission by post as newspaper.**